

La kolekto *Studoj* de Kultura Centro Esperantista
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 540, 1974.02.13 & 16

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Unu el la kaŭzoj de la malrapida disvastiĝo de Esperanto en la fakajn kaj klerajn mediojn estas, ke la fakuloj kaj kleruloj mem ege malfacile povas publikigi siajn esperanto-verkojn. Kiam sur via skribotablo aŭ en tirkesto kuŝas de jaroj manuskripto de eseo aŭ scienca raporto, kiu neniam povis aperi malgraŭ siaj kvalitoj, ĉar nenia eldonejo ekzistas por tiu publikigo, tiam vi ne sentas emon daŭre verki en Esperanto. Vi preferas verki nacilingve, kvankam vi ŝatus kontribui al la riĉigo de la faka literaturo de Esperanto.

A.- Konstatinte tiun bedaŭrindan situacion la Centra Komitato de Kultura Centro Esperantista decidis alporti sian kontribuajon al ĝia solvo. Ho, ni bone konscias, ke tiu kontribuajo estas ankoraŭ nura komenco, ke multon pli oni devus povi fari. Sed ni tamen opinias, ke alvenis la momento paroli pri tiu komenco kaj ties originaleco.

Cl.- En aŭtuno 1972 Kultura Centro Esperantista metis en sian labor-programon por la periodo 1973-1976 la ĉi-sekvan punkton 44 sub la titolo *Studoj* :

A.- « *Sub la titolo **Studoj**, Kultura Centro Esperantista eldonos multobligitajn kajerojn, en kiuj povos aperi la stud- kaj serĉ-laboroj de la esperanto-klerularo. Tiuj studoj aperos en la limigita nombro de 50 ekzempleroj por disvendado, 20 kajeroj por la aŭtoro kaj 20 ekzempleroj por informado de la ĉefaj esperanto-gazetoj. La disvendado de la 50 vendeblaj kajeroj devas kovri la pres-kostojn kaj ĉiujn aliajn elspezojn kaj kovri reeldon-elspezojn. La aŭtoroj ne estas salajrataj.* »

Cl.- Ekde printempo 1973 la Centra Komitato de Kultura Centro Esperantista ekpaŝis al la eksperimenta efektivigo de tiu punkto de sia labor-programo. Estante sekretario de Kultura Centro Esperantista, mi havis la honoron tajpi la stencilojn, kiuj ebligis la eldonadon de la tri unuaj kajeroj de tiu multobligita kolekto, kies titolo estas *Studoj*. Helpemuloj kunlaboris al la desegnado de la kovril-paĝo kaj al laagrafado de la kajeroj. Kaj en aprilo 1973, okaze de la 28-a Kongreso de SAT-Amikaro en Lausanne, tiuj tri unuaj senpretendaj kajeroj povis esti ekspoziciitaj en la libro-ekspozicio.

A.- La unua kajero povas interesi nur ege fakan publikon. Temas pri ***Bibliografio de la publikaĵoj de Reinhard Haupenthal***. La enhav-resumo de tiu kajero diras : « *Tiu ĉi verketo prezentas kronologie ĉiujn publikaĵojn de Reinhard Haupenthal kaj donas superrigardon pri liaj ĉefaj manuskriptoj.* »

Cl.- Malantaŭ ĉiu kajero kaj sur la informiloj de la kolekto *Studoj* aperas similaj resumoj, kiuj alportas precizan ideon pri la enhavo de la proponitaj publikaĵoj.

A.- Jen, laŭ la resumo, la enhavo de la dua kajero, kies titolo estas ***La socia romano en Esperanto*** : « *El 42 plej divers-temaj romanoj originale verkitaj en Esperanto, Henri Vatré specimene elektis tri verkojn kun tipe socikritika tendenco : **Metropoliteno**, **Turstrato 4** kaj **Vojaĝo al Kazohinio**, kiuj inspiriĝis de la ekonomie kaj politike krizaj jaroj inter la du mondmilitoj. Li skize komparas la sintenon de tri temperamente tre malsimilaj verkistoj antaŭ la sociaj problemoj de nia mondo.* »

Cl.- Tiu dua kajero, kiel vi konstatis, aŭdinte la resumon, interesos literatur-ŝatantojn. La tria kajero havas arkivan karakteron. Jen ĝia enhavo, laŭ la resumo : « *Publikigo de 8 leteroj, kiujn Eugène Adam sendis en 1920 al Edmond Privat kaj kiuj nun troviĝas en la Biblioteko de la urbo La Chaux-de-Fonds.* » La titolo de tiu tria kajero de la kolekto **Studoj** estas : **Leteroj de Eugène Adam aŭ Lanti al Edmond Privat kun komentarioj de Pierre Hirsch.**

A.- Eldonante tiujn tri multobligitajn kajerojn Kultura Centro Esperantista faris provon. Nenia propaganda kampanjo estis entreprenita. Nur pere de la informado, kiun la aŭtoroj mem faris dissandante la 20 ricevatajn ekzemplerojn, la entrepreno estis diskonigita. Kaj el la tuta mondo alfluis tiom da mendoj, ke reldono de du kajeroj jam estas necesa. Kun la mendoj alvenis tri interesaj manuskriptoj kaj kunlabor-proponoj.

Cl.- Pro tio, dum la jaro 1974, estos eldonitaj novaj kajeroj. La stencilojn nun tajpas helpema junulo nomata Daniel Mühlemann. Post unua eksperimenta provo la Centra Komitato de Kultura Centro Esperantista akiris la certecon, ke tiu multobligita kolekto de fakaj **Studoj** respondas al vera bezono. Jam nun la verkemo de kelkaj sciencistoj estis revekigita.

A.- La venontan semajnon ni legos al vi erojn el la tria kajero de la kolekto **Studoj**, kiu estas dediĉita al Eugène Adam aŭ Lanti.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!